

Annecy, je la 15^a de Novembro 1927

con 10 fr.

R. 191 X 1. 1927. Con Kanje
Albestimata Sinjoro,

Mi ricevis vian satindan verkon
Interlingua, pro kiu mi dankas vin
tutkore. Ĝin mi legis plej atente
kun granda intereso, kaj tre sincere
mi gratulas vin pro via laboro vere
rimarkinda.

Ni, malnovaj Esperantistoj, konas
tre bone la mankojn de nia lingvo,
sed ni vidas ankoraŭ la mankojn
de la aliaj, kaj jen pro kio ni ne
volas ŝanĝi kaj diskuti konstante
kaj senfine. En via grandanimeco
vi esperas ke ian belan tagon ĉiuj
interlingvistoj interkonsentos, kaj ke

la diversaj sistemoj kunfandiĝos
en unu sola absolute perfekta.
Jen bela revo! sed ĝis tiam ni volas
konservi nian Esperanton, Kie, Kvan-
tam neperfekta, taŭgas tamen kaj
prograsas ĉiam plu.

Cetere ĝi fatale plibonigiĝos kun
la uzado. Jam oni diras: Rusio apud
Rusujo kaj Ruslando; ekzisti, ekzameno
apud ekzisti, ekzameno; herziti, konkeri,
aspekti, en loko de sanĉeligi, almiliti,
elrigardi; amara, rara, harda, en
loko de maldolca, malofta, malmoda,
k. c. Ni reformos la lingvon senŝkue,
kaj ne perforte, revolucie, Kiel la dis-
toj. La taŭgeco de ia lingvo ne depen-
das sole de la juĝoj, ofte kontraiaj, de
la lingvistoj, sed de la uzantoj mem.

La mondo venos al ni ne kiam
nia lingvo estos perfekta, sed kiam
ni estos sufiĉe fortaj. Vidu, per
ekzemplo, la anglan lingvon: pro-
ĝia disvasteco kaj malgraŭ, ke ĝia
ortografio kaj ĝia prononco estas
abomene absurdaj, ĝin oni lernas
multe pli ol vian belan italan
lingvon, tiel harmonian kaj facile
prononceblan.

Mi, Kiel Franco, deziras kom-
preneble bonan sukceson al la
latino sine flexione; sed mi sincere
dezas konfesi, ke ĝin la kleraj
latinistoj ne ŝatos, ĉar ili neniam
konsentos pri tio, ke oni kripligos
kaj mutilos la klasikan latinon;

Krom tio la lingvo internacia ne estas destinata sole por ni, latinidoj, kaj fine ia lingvo sen gramatiko, sen afiksoj aspektas iom kiel moluska estajo, sen spino, nek ostoj; ne tro, sed iom da gramatiko estas necesa por ^{ĉi ti} nekiajn lingvajn kutimojn.

Por konkludi, kvankam mi estas kaj restos obtine fidela al la Zamenhofa lingvo, almenaŭ en ĝia esenco, mi volonte sendas al vi 10 frankojn, tial ke mi opinias, ke Esperanto provas, ankau devas profiti, Kiam eble, de ĉiuj saĝaj, senpartiaj kritikoj; mi diras Kiam eble, ĉar kontentigi ĉiun estas neeble.

Kun alta estimo, samideane via,
Boucon, 10. Boulevard du Lycée
Annecy (Haute-Savoie)

Mi ĵus ricevas la 3-an numeron de Akademio pro Interlingva,
ankoraŭ plian dankon.